

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2008 numero 2-a: aprilo-junio



Fotis Claude Gacond

Pintempe el la monto San Salvatore
rigardo al la digo de Melide ĉe la Lago de Lugano.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, CP 480,
CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2008-3 : julio-septembro :
junie 10.

2008-4 : oktobro-decembro :
septembre 10.

2009-1 : januaro-marto :
januare 10.

2009-2 : aprilo-junio :
marte 10.

Konsultu la retejon de SES !

www.esperanto.to/ses

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :
032 932 18 88.

Retpoŝto : mireille.grosjean@rpn.ch

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.

Retpoŝto : info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,
1002 Lausanne. Tel.: 079 612 75 79.

Retpoŝto: stefano.keller@kontakto.info

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ 1. Tel.: 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-
Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*


Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2008- 2- redaktis Stefano Keller

Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo sabate, la 12-an de aprilo 2008

Berno, Kongresejo Allresto, Effingerstr. 20



Invito al la jarkunveno 2008 en Berno

UNO proklamis la jaron 2008 *Jaro de lingvoj* kaj komisiis UNESKO-n, kunordigi la agadon. UEA kaj la landaj asocioj partoprenas la kampanjon planante eventojn por disvastigi la mesaĝon de la ĝenerala direktoro de UNESKO, Koichiro Matsuura. La Jaro de lingvoj donas bonvenan okazon por informi pri Esperanto kaj ties rolo en la internacia komunikado. Tial ankaŭ la jarkunveno de SES traktos temon rilatan al la lingvoj.

Sabate, 12-an de aprilo 2008

Kongresejo Allresto, Effingerstr. 20, Berno, perpiede 10 minutojn de la stacidomo (direkto Bubenbergrplatz-Hirschengraben-Effingerstrasse), aŭ per tramoj 3 aŭ 5 ĝis Kocherpark.

Programo

- 11h00 «*Irado tra la lingvoj*» gvidota de Mireille Grosjean (Vidu prezenton post la Tagordo de la Ĝenerala Kunveno)
- 12h30 Tagmanĝo en aparta salono. Menuo kun aŭ sen viando (inter 15-20 CHF), elektebla surloke.
- 14h30 Ĝenerala Kunveno de SES laŭ anoncita tagordo.
- 16h30 Fino

Pro organizaj kialoj necesas anonci sin ĝis komence de aprilo ĉe Bruno Graf, Jurastr. 23, 3063 Ittigen, tel. 031 921.44.59, rete: bgraf.o@bluewin.ch. Dankon pro via atentemo kaj partopreno.

Tagordo de la Ĝenerala Kunveno de SES

1. Salutado, konstato de la nombro de ĉeestantoj, informoj pri senkulpiĝoj
2. Evoluo de la membraro
3. Akcepto de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2007 (Ĝenevo)
4. Vivo de la societo: akcepto de la estrarraporto
5. Financoj. Prezento kaj akcepto
6. UEA kaj ILEI: delegitoj.
7. Laboro plenumita de la estraro, projektoj 2008.
8. Nova svisa esperanto-revuo, perspektivoj de grupa - tutsvisa vivo.
9. Buĝeto 2008
10. Diversaĵoj

Proponoj al la tagordo devas atingi Mireille Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets, aŭ rete: mireille.grosjean@rpn.ch ĝis la 4a de aprilo 2008. Proponoj devas esti subtenataj minimume de tri personoj.

Irado tra la lingvoj

matena programo de nia kunveno je aprilo 12 en Berno.



Interesa programo por mezlernejoj, gimnazioj kaj plenkreskuloj kompreneble. Ni promenados laŭ iu temo tra la lingvoj de ni konataj, unue esperanto, poste la germana kaj la franca, certe tra la angla, la itala kaj la hispana, kaj tra aliaj lingvoj laŭ la ĉeestantoj. Mi iom povos montri pri la japana. La temoj estos ekzemple la alparolo aŭ proksima aŭ ĝentila, kiel oni starigas demandon, ktp. Mi ne deziras ĉi tie tro precize priskribi mian prezenton, devas resti iom da surprizo !! Fine ni kune iom malkovros aspekton de la sŭahila lingvo.

Ĝis aprilo ! Mirejo Groĵan (Mireille Grosjean), fremdlingvoinstruisto

Kunfestu la oran geedziĝan jubileon de Claude kaj Andrée Gacond en La Sagne la 17-an de majo.

La 17-an de majo 2008 Claude kaj Andrée Gacond jubileos kvindek-jaran geedzan vivon, kaj tion ili festos pere de publika koncerto en la bela flamgotika preĝejo de la vilaĝo La Sagne, kie ili travivis sian geedziĝon en majo 1958 ĉirkaŭataj ne nur de familianoj kaj amikoj, sed ankaŭ de ĉiuj gelernantoj de la vilaĝo, inter kiuj pluraj praktikis esperanton kadre de eksperimenta kurso instigita de la lerneja komisiono. Marie-Louise Münger-Ackermann, kiu amike prezidos la koncerton, tiel lernis la zamenhofan lingvon.

La unua duono de la geedza vivo de Claude kaj Andrée Gacond disvolviĝis en la vilaĝo La Sagne, antaŭ ol ili translokiĝis en La Chaux-de-Fonds, kie Claude deĵoris ne nur kiel instruisto, sed ankaŭ gvidis la aktivecon de CDELI kaj KCE, dum Andrée instruis bekflutadon en la muziklernejo. Dum 30 jaroj ambaŭ regule veturis al Berno por dialoge prelegi esperantlingve kadre de la elsenda programo de Svisa Radio

Internacia. Nun ambaŭ emeritoj daŭrigas sian poresperantan aktivecon kadre de CDELI.

Koncerte kantos la esperantokanzonisto Olivier Tzaut kaj flutos lertaj gelernantoj de Marie-Louise Thommen, nuna bekfluta instruisto en la muziklernejo.

Post aperitivo konkluda al la koncerto Luc Allemand gvidos la marŝemulojn al la agrablaj gastejoj de Tête-de-Ran kaj La Vue-des-Alpes. Tiu trihora migrado tra ĵurasaj paŝtejoj konkludiĝos per busa veturo je la 17.35 al la stacidomo de La Chaux-de-Fonds, alveno : 17.50.

Profitu pri tiu neordinara programo kun familianoj kaj amikoj. Sidlokoj en la buso al La Chaux-de-Fonds devas esti rezervitaj, tial la marŝontoj sin nepre anoncu kiel eble plej frue al Nancy Fontannaz : rete : nancyfontannaz@freesurf.ch aŭ telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo). Tiuj aliĝintoj ricevos sandviĉojn dum la aperitivo konkludanta la koncerton.

Detalaj informoj

Fervoja veturo

La preĝejo de La Sagne atingeblas fervoje per la trajneta linio La Chaux-de-Fonds – Les Ponts-de-Martel. Eliro je la haltejo **La Sagne-Eglise** je la 11.12 per trajno trafebla en La Chaux-de-Fonds je la 11.02. Tuja supreniro al la preĝejo, por akurate ĉeesti la koncerton, kiu komenciĝos je la 11.15 tuj post la alveno de la trajnintoj.

Por trafi la trajnon al La Sagne-Eglise veturu al La Chaux-de-Fonds. Jen la trajnaj foriraj horoj el diversaj urboj :

Basel : 09.03, ŝanĝo en Biel : 10.17. Alveno en La Chaux-de-Fonds : 10.58.
Bern : 09.42, ŝanĝo en Biel : 10.17. Alveno en La Chaux-de-Fonds : 10.58.
Biel : 10.17. Alveno en La Chaux-de-Fonds : 10.58
Genève : 09.14, ŝanĝo en Neuchâtel : 10.31. Alveno en La Chaux-de-Fonds : 10.59.
Lausanne : 09.45, ŝanĝo en Neuchâtel : 10.31. Alveno en La Chaux-de-Fonds : 10.59.
Neuchâtel : 10.31. Alveno en La Chaux-de-Fonds : 10.59.
Zürich : 08.30, ŝanĝo en Biel : 10.17. Alveno en La Chaux-de-Fonds : 10.58.

Aŭtomobilantoj

Aŭtomobila parkado konsilata : ĉe la stacidomo de La Sagne-Eglise.

Rendevuo ĉe la preĝejo de La Sagne

10.45 : Ekrenkonto ĉe la preĝejo kun la jubileantoj kaj la muzikistoj, kiuj prezentos siajn flutojn el diversaj grandecoj.

Koncerto

11.15 : Komenco de la koncerto, kies programon ricevos la alvenantoj.

Amikaj prezidaj vortoj franc- kaj esperant-lingvaj de Marie-Louise Münger-Ackermann kaj enkonduka kanzono de Olivier Tzaut.

Marie-Louise Thommen prezentas la kvarteton de la bekflutistoj Sarah Gerster, Sabrina Matthey, Sébastien Gruring kaj Matteo Prandi.

Disvolviĝo de la muzika programo.

Konkludaj vortoj de Marie-Louise Münger kaj kanzono de Olivier Tzaut.

Aperitivo

12.15 : La koncerton konkludos interkonatiĝa aperitivo. Tiam la migrontoj sin anoncintaj al Nancy Fontannaz ricevos sandviĉojn, kiuj donos al ili marŝoforton.

13.00 : Konkludo de la renkonto. Tiam la migrontoj al Tête-de-Ran kaj La Vue des Alpes grupiĝas ĉirkaŭ Luc Allemand por ekmarŝi. (Okaze de nekonvena vetero proponiĝos anstataŭa programo kun vizito de muzeoj en La Chaux-de-Fonds.)

-oOo-

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia
Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 42.

Retadresoj : claude.gacond@ne.ch, martine.schneller@ne.ch, nancy.fontannaz@ne.ch

**Ni havos la privilegion reĝui pri la prelega vizito de
André Cherpillod
la sabaton 11-an kaj la dimanĉon 12-an de oktobro**

**La sabata programo disvolviĝos en CDELI
kun la studtemo**

Ido, unu jarcenton poste

André Cherpillod, ĵus eldoninta legindan eseon, kiu titolas *Ido, unu jarcento poste*, raportos pri la naskiĝo de Ido antaŭ unu jarcento kiel reformemo de Esperanto kaj analizos la sekvan paralelan evoluon de ambaŭ planlingvaj movadoj. Li priskribos la etapojn de la disvolviĝo de la zamenhofa lingvo ekde la lanĉo de la *Unua Libro* de 1887 ĝis la franca periodo daŭre karakterizata de reformema malsano. Li prezentos al ni, inter la tiamaj ĉefroluloj de tiu franca periodo, la misteran markizon Louis de Beaufront kaj la filozofon Louis Couturat, kiuj ekde 1908 dediĉis siajn fortojn al la propagando de la Ido-projekto rezultinta de la kunsidoj de la komisiono de la Delegacio por Alpreno de Helplingvo Internacia. Per gramatikaj, skribaj kaj vortfaradaj komparoj inter Ido kaj Esperanto André Cherpillod demonstras, en kio tiuj idiomoj interlingvistike pli malsimilas, ol oni ĝenerale opinias. Ni konstatos, ke la Ido-opozicio havis pozitivan influon por

Esperanto. Ĝi ekzemple kondukis al la vortfarada analizo de René de Saussure kaj al la movada reorganizo de Hector Hodler per la kreo de Universala Esperanto-Asocio, dum la reformistoj iĝis adeptoj de Ido. Post la milito de 1914-1918 Esperanton karakterizos beletra dinamismo, dum Ido malfortiĝos pro aliĝo de siaj reformistoj al la pli naturalisma lingvo-projekto Occidental proponita de Edgar von Wahl ĉe Ligo de Nacioj, opozicie al Esperanto. Ekde tiam la atakoj de la lastaj idistoj ne koncernos plu Esperanton, sed la lingvo-projekton de von Wahl. Konklude André Cherpillod parolos pri la verkoj aperintaj en Ido kaj el la brokanta libro-servo de CDELI interesatoj povos akiri kelkajn dokumentojn kaj librojn en Ido.

Horaro:

10.00 : malfermo de la CDELI-salono je la 2-a etaĝo de la biblioteko, eblo aĉeti librojn, babilo kaj kafumi.

10.45 : 1-a prelega periodo.

11.00 : paŭzo.
12.00 : 2-a prelega periodo.
12.45 : kuna foriro al tagmanĝo.
14.15 : 3-a prelega periodo.
15.00 : paŭzo.
15.15 : 4-a prelega periodo.
16.00 : Konkludo.
Kiu buso veturos al La Vue-des-Alpes por ĉeesti la dimanĉan renkonton kun André Cherpillod, tiuj havos la tempon trafi la buson por la Vue des Alpes je la 16.20.
La aliaj povos plue teumi, diskuti kun la preleginto kaj aĉeti librojn.
17.00 : Oficiala fermo de la CDELI-salono.

Aliĝo :

Por mendi konvenan kunvenan salonon ni devas frue koni la nombron de la partoprenantoj, tial ni petas ĉiujn interesatojn **kiel eble plej frue sendi sian aliĝon** al Nancy Fontannaz : telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) aŭ rete : nancy.fontannaz@gmail.com.

Partoprenkotizo :

La partoprenkotizo estas po fr 20.- por persono. Por aliĝo post la 10-a de septembro ĝi altiĝas al po fr 25.- por persono. Duonprezo por la studentoj.

La sabatan programon sekvos dimanĉa programo en La Vue-des-Alpes. Vidu la ĉi-sekvajn klarigojn.

La dimanĉa programo disvolviĝos en la hotelo de La Vue-des-Alpes kun la studtemo

La Biblio

ĉu historio? ĉu legendoj?

André Cherpillod, ĉijare ĵus eldonis 189-paĝan libron bonege dokumentita sub la titolo *La Biblio – ĉu historio? ĉu legendoj?* La saman verkon li ankaŭ publikigis en la franca lingvo. Tial decidiĝis, ke franc-lingve li prelegos pri tiu temo dum la dimanĉa tago. Tio donos la eblon ne nur al la esperantistoj aŭdi lian raporton, sed ankaŭ al la publiko franc-lingva. Inter la partoprenantoj al niaj aranĝoj la plimulto estas franc-lingva. Kaj ofte la nefranc-lingvanoj ankaŭ sufiĉe bone komprenas la francan. Cetere okaze de ne preciza kompreno, ĉiu povos peti precizigon esperant-lingvan. La partoprenintoj al la semajnfino dediĉita al Hillel kaj al la zamenhofa homaranismo estis impresitaj pri la lingvaj, historiaj kaj kulturaj konoj de André Cherpillod. La saman admiron pri la

vasteco kaj objektiveco de la kulturo de André Cherpillod akiras la legantoj de lia pribiblia verkego. Jen ekzemple esperant-igo de mesaĝo de Mireille Hadas-Lebel, profesoro de la hebrea en la pariza universitato La Sorbonne: „*Vian libron pri la Biblio mi bone ricevis. Mi sentas la bezonon vin vigle danki, ĉar mi opinias ĝin tre utila. Unue ĝi respegulas vastan exploremon intelektan, pro tio ĝi respondas al amaso da demandoj, kiujn multaj erudiciuloj preter lasas. Krome ĝi tre klare resumas faktojn ege komplikajn. Fine ĝi dependas de neniu doktrino kaj atestas pri libera spirito en plena posedo de siaj rimedoj. Mi lernis multajn faktojn.*“ Tio instigu la partoprenintoj al la sabata seminario resti en la regiono por ankaŭ dimanĉe aŭskulti André Cherpillod, tiam en la franca lingvo.

Ni elektis por okazigi tiun prelegan dimanĉon la mont-pasejon La Vue-des-Alpes, ĉar tie ni povas disponi pri hotelaj servoj kontentigaj modestprezaj. Sed tial ni devos senprokraste rezervi la necesajn dormĉambrojn, ĉar tranoktaj mendoj de migrantoj konstante alvenas. Tial ni instigas la partoprenemulojn ne atendi por konigi sian aliĝon, por ke ni povu rezervi kiel eble frue la litkategorion deziratan. Jen do sekvas informoj pri la litkategorioj kaj ankaŭ pri la prezoj de la manĝoj.

Kun la partoprenintoj al la prelego de André Cherpillod en CDELI, kiuj tuj poste veturos buse aŭ per propra aŭtomobilo al la Hotelo de La Vue-des-Alpes, ni ĝuos pri kuna vespermanĝo kaj pri posta amika vespero, dum kiu ni certe havos interesajn diskutojn. Kaj eĉ poste, dum la dimanĉo nenio malhelpos la praktikon de esperanto dum la paŭzoj kaj tagmanĝo, eĉ se en la publiko espereble venos francparolantoj. Kunekzisto de la lingva dueco povos eĉ vekti esperanto-lernemon.

Horaro sabata:

16.35 : alveno de la buso el La Chaux-de-Fonds.

Ĉar la hotelo estos ricevinta la liston de la partoprenantoj, ĉiu alvenanto povos tuj konkeri sian liton.

Kaj ĉar la loko okaze de bela vetero proponas panoramon al la Alpa Montaro, kiu etendiĝas de la Monto Blanka kaj Savojo okcidente ĝis la regiono Săntis oriente, kaj norde al la franca montaro Vogezoj, atendante la vespermanĝan horon tiuj alvenintoj certe promenos admirante la pejzaĝon, kaj okaze de pluvo, ili malkovros, ke la restoracia salonego ebligas kontentigajn grupiĝojn.

18.30 : grupiĝo por komuna vespermanĝo en la hotela manĝejo daŭrigota de amika vespera kunesto.

Horaro dimanĉa:

Matenmanĝo estas inkludita en la tranokta prezo.

10.00: malfermo de la prelegsalono, kie aĉeteblos la libroj franc- kaj esperantlingvaj de André Cherpillod.

10.45 : 1-a prelega periodo.

11.00 : paŭzo.

12.00 : 2-a prelega periodo.

12.45 : tagmanĝo laŭ menuoj menditaj matene. Prezoj inter fr 20.- kaj 30.-

14.15 : 3-a prelega periodo.

15.00 : paŭzo.

15.15 : 4-a prelega periodo.

16.00 : Konkludo.

16.35 : Busa eliro. Alveno en la stacidomo de La Chaux-de-Fonds: 16.50.

17.00 : Oficiala fermo de la prelegsalono.

Aliĝo :

La tranoktontaj de la sabato al la dimanĉo **mendu kiel eble plej rapide la litkategorion deziratan** al Nancy Fontannaz : telefone : 021 728 31 27 aŭ rete : nancy.fontannaz@gmail.com.

Prezoj:

en ĉambro komforta kun banĉambro kaj televido: unu persono: fr 85.- du personoj: fr 130.- (do po 65 por persono).

en ĉambro standarda kun lavabo, sed duŝo kaj necesejo eksterĉambraj: unu persono; fr 65, du personoj: fr 90.- (do po fr 45.- por persono. Por 3-a aldona lito: po fr 45.- por la koncernulo.

en dormejo kun alportendaj tukoj: po fr 35.- por persono.

Tiuj prezoj inkludas la matenmanĝon.

Partoprenkotizo :

La partoprenkotizo estas po fr 20.- por persono. Por aliĝo post la 10-a de septembro ĝi altiĝas al po fr 25 por persono. Duonprezo por la studentoj.

Duonprezo por la partoprenintoj al la sabata seminario en CDELI.

-oOo-

CDELI

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Claude Gacond, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn : **aprile 19, junio 21** (studo en la naturo), **novembre 15**.

Kultura seminario okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **junio 7, novembre 8, decembre 6**. La celo de tiu seminario, kiu disvolviĝas sub la aŭspicio de SES, ILEI kaj UEA, ne estas la studo mem de la lingvo, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Partoprenintoj al 15 tiaj sabatoj estos rekompencitaj per ricevo de atestilo. Ĉi-sezone ni dediĉas nian atenton al la revuo *Literatura Mondo*, kaj al la

verkistoj, kiujn ĝi kunigis kaj diskonigis, kaj al la decidiga influo, kiun la budapeŝta skolo havis por la gramatika stabiligo de esperanto.

Horaro de ambaŭ aranĝoj

10.00 : Malfermo, eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

10.45 : Oficiala malfermo, formiĝo de la stud-rondoj. 11.00 : Studo. 11.45 : paŭzo. 12.00 : Studo. 12.45 : foriro al tagmanĝo. 14.15 : Studo. 15.00 : paŭzo. 15.15 : Studo. **16.00 : Konkludo** kaj teumo, librovendo. **17.00 : Oficiala fermo**.

Aliĝo : **Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj** ĉiu bonvolu nepre antaŭanonci sian partoprenon almenaŭ ĝis la ĵaŭdo antaŭ la koncerna aranĝo **al Nancy Fontannaz : telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo) aŭ rete : nancy.fontannaz@gmail.com**.

Partopren-kotizo : Por minimuma kovro de la elspezoj la partopren-kotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato (senpage por studentoj) kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario (duonpreze por studentoj)

-oOo-

Romanda esperanta laborgrupo

Informoj : Mara kaj Daniel Schoeni-Bartoli, Pommeraie 15, 1008 Pully.
maradani@bluewin.ch Tel. : 021.624.44.23

aŭ

Elisabeth kaj Dominique de Mestral, Le Prieuré 8 – 1163 Etoy
de.demestral@bluewin.ch Tel. : 021.808.76.43

Ĉiujn 2-3 semajnojn kunvenas personoj, kiuj ŝatas legi, cerbumi, dialogi pri lingvoj, literaturo, monda kulturo. Elektitaj verkoj, artikoloj

estas pretigitaj hejme kaj diskutataj dum renkontoj.

Ni ĵus studadis la libron de Claude Piron *La Bona lingvo* – resumo de

tiu laboro aperos en la venonta eldono de *SES Informas*. Nun ni prilaboras la 10an Raporton el Japanio de Hori Jasuo por pretigi ties prelegon en Etoy la 17an de aprilo 2008.

Ni ankaŭ preparas blogon pri nia laboro.

Krom tio, okazos renkonto kun alemanaj familioj la 1an de novembro 2008 en berna regiono (Gantrisch).

Por pli da informoj : Mara kaj Daniel Schoeni-Bartoli aŭ Elisabeth kaj Dominique de Mestral. Vidu supre.

Esperanta svisa koruso

Informoj ĉe Elisabeth de Mestral (direktorino) – Le Prieuré 8 – 1163 Etoy
Tel. : 021.808.76.43 de.demestral@etoy.ch

Kreita antaŭ unu jaro kaj duono, grupo de ĉirkaŭ 10 simpatiaj kantantoj renkontas sin po unu fojon monate en Etoy. Ni kantas kaj tag-manĝas kune en agrabla kaj humur-aplena etoso.

Por konatigi nian popolan muzikan heredaĵon ni elektis ĝis nun tradician romandan repertuaron (J. Bovet, C. Boller, G. Haenni, J. Dalcroze...), kiu estas tradukita en esperanto (ĉefe fare de Dominique de Mestral). Mi adaptas kvarvoĉajn partiturojn kaj ni sendas perrete registradon de ĉiu voĉo por helpi la hejman laboron de la kantantoj.

La repertuaro iom post iom pli-grandiĝas (La Jodlado, La Vinberisto, La Katerino de Finhaut, La

Belaj vilaĝoj, La Virinoj de Ĉi-tie, Ege simple, la Bovina vico, la Eta Kapristo...) kaj ni malfermas nian repertuaron al aliaj muzikoj kiel "Himno nokta" de J.-Ph. Rameau....


Nuna celo : Eta kantado dum SES tago kaj prezento de kelkaj svisaj kantoj dum la UK 2008 en Roterdamo.

Novaj kantantoj estas bonvenaj precipe tenoro aŭ aldo.

Informoj ĉe Elisabeth de Mestral, vidu supre.

Elisabeth de Mestral

-oOo-



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20.00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Venontaj kunvenoj

Aprile 24 : Filmo : Gerda malaperis.

Maje 29 : Prelego.

Junie 26 : Grün' 80.

Julie 17 : Salat-bufedo ĉe s-ino Nicole Bérout-Focke.

Aŭguste 24 : Ekskurso kaj kradrostado en Bettingen.

Septembre 25 : Rakontoj pri la ferioj.

Oktobre 23 : S-ro Rainer rakontas pri Skandinavio.

Novembre 27 : Pretigo de la programo 2009.

Decembre 13 : Zamenhofa festo en Bazelo.

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45.

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15.

Venonta kunveno

Junie 3 : Diskuto pri la esperanto-konkurso kaj ties rezultoj.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 657 14 56

esperanto@isuisse.com

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20.00.

Venontaj kunvenoj

Aprile 7 : Carlo kaj Dorothee Baumgartner el Ĝenevo iris al la UK en Japanio en 2007. Ili partigos kun ni vojaĝajn etosojn.

Jaŭdon la 17an de aprilo je la 19h00 okazos en Etoy (inter Laŭzano kaj Ĝenevo) en la Malnova lernejo Le Prieuré 1 :

Aparte interesa prelego de

HORI Jasuo

verkinta esperante

10 Raportojn pri Japanio.

S-ro Hori instruis la anglan lingvon en japana universitato (gubernio Aici). Li estas prezidanto de la Komisiono de UEA pri Azia

Esperanto-Movado kaj estrarano de UEA pri landa kaj regiona agadoj. Inter aliaj verkoj li skribis *Anglan Gramatikon Cougar* en la japana kaj la angla. Li ludas ankaŭ diversajn aziajn muzikilojn.

Aliĝu kiel eble plej rapide (ni devas rezervi salonon) ĉe :

Elisabeth kaj Dominique de Mestral,
Le Prieuré 8, 1163 Etoy.

Tel. 021.808.76.43 aŭ prefere rete :
de.demestral@bluewin.ch

Kostoj estos dividitaj inter la partoprenantoj (veturado de Sinjoro Horiĝis Lyon okaze de prelega turneo en Francio) : inter frankoj 10.- kaj 15.-

Maje 5. David Bühlmann rakontos siajn travivaĵojn en Esperantio kaj venu rakontis la viajn.

Junie 8 dimanĉe : Tuttaga ekskurso surpriza.

Septembre 1 : Venu kun viaj demandoj, kaj lingvaj problemoj, ni provos respondi al vi. Venu kun viaj malkovraĵoj kaj lingvaj kuriozaĵoj, vi partigos ilin kun ni.

Oktobre 6 : Christiane Andreae parolos al ni pri Japanio. En 2007, dum sia vojaĝo al la UK, ŝi enamiĝis al la lando.

Novembre 3 : Temo decidota.

Decembre 13 : Zamenhofa Festo en Laŭzano.

2009 januare 5 : Temo decidota.

Raporto

La Ĝeneralan Asembleon okazintan je la 4-a de februaro partoprenis 18 LES-membroj kaj 3 gastoj. Senkulpiĝis 6 aktivaj membroj. Unuanime akceptiĝis la protokolo de la

lasta asembleo, la prezidanta raporto kaj la kasraportoj kun 3 sindetenoj. La membroj leviĝis honore al la forpasintoj: Gabriel Maillard, Franz Brugger kaj Claude Piron. La jarotizo restos fr 50.- por la aktivaj membroj kaj fr 30.- por la pasivaj. Laurent Burgbacher plue okupiĝos pri la retejo de la societo kaj François Randin pri la datoj de la kunsidoj.

La plej grava punkto koncernis la Informilon, kiu aperos ĉefe rete, sed mendeblis laŭ papera versio.

Nova komitato estis unuanime elektita. Ĝi konsistas el David Bühlmann, prezidanto ; Stéphanie Strappazon, vicprezidanto ; Sonia Daubercies Chatelan, kasisto kaj François Randin, sekretario.

Dosiero pri esperanto preparita de Claude Piron estis bone akceptita de la ministro de edukado Anne-Catherine Lyon fine de 2007. Nicole Margot, Dominique de Mestral kaj Claude Piron kunsidis por organizi renkonton kun ŝi. Sed la subita morto de Claude Piron bedaŭrinde nuligis la antaŭviditan rendevuon kaj provizore endormigis la projekton.

La marta kunveno grupigis 10 membrojn, kiuj venis kun diskutotaj lingvaj demandoj. David Bühlmann proponis literaturan ludon tutjaran sub formo de kreo de romano titolita *La kastelo mistera*. Li verkis la unuan paragrafon kaj instigis la ĉeestantojn diversmaniere daŭrigi la rakonton.

Babilada Rondo

Babilada rondo okazas vendrede je la 19h00 ĉe unu aŭ alia el la

esperantistoj dezirantaj plibonigi sian parolkapablon. Ĉiuj konsentas sin reciproke korekti kaj okazas kummanĝo de kanada pikniko. Jen la venontaj rendevuoj:

Aprile 11 vendrede ĉe François Randin en la Vallombreuse 14, 1004 Laŭzano. Tel. 076 411 14 55.

Aprile 25 vendrede ĉe Sonia Daubercies Chatelan, Rue du Coin d'en Bas 5, 1092 Belmont. Tel. : 079 649 88 86.

Sekvaj antaŭviditaj datoj : la vendredoj 16-a kaj 30-a de majo.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke.

Restoracio Bellini (hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50
Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

Venontaj kunvenoj

Aprile 02 merkrede : ĉe ges-roj Anna & Koni Rey 14h00: Paroliga leciono kun Sonja Brun, 14h30: Sciindaĵoj kaj originalaĵoj el la pasinto de Lucerno kun Annelies Dettling.

Maje 07 merkrede : Restoracio Bellini 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Paul Scherer.

Junie 11 merkrede : ĉe ges-roj Anna & Koni Rey 14h00 : Paroliga leciono kun Sonja Brun, 14h30 : Henri Dunant – samtempulo de L. L. Zamenhof, kun Koni Rey.

Julie 9 merkrede : Restoracio Bellini 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Paul Scherer.

Aŭguste 8 vendrede : Vespera ekskurseto kun Koni Rey.

Septembre 3 merkrede : Restoracio Bellini 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Sonja Brun.

Oktobre 1 merkrede : ĉe ges-roj Anna & Koni Rey 14h00: Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30 : Ludado kun Sonja Brun (ĉiu prezentu ludon).

Novembre 12 merkrede : Restoracio Bellini 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Sonja Brun.

Decembre 10 merkrede : ĉe ges-roj Anna & Koni Rey 14h00: Zamenhofologio kaj programo 2009 kun Paul Scherer.

2009 januare 7 merkrede : Restoracio Bellini 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Sonja Brun.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj Wolfram Fischer. Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj : la unuan merkredon de la monato je la 19.00 en la Restoracio Schweizerhof, Bahnhofstrasse 18 (pedire je kvin minutoj oriente de la stacidomo).

Venontaj kunvenoj

Aprile 2 : Legi kaj prezenti tekstojn (laŭ la maniero de Sylvain Lelarge). Ĉekomence rakonta rondo.

Maje 7: Prezento de filmo pri la infanteatraĵo dum Novjara Renkontiĝo. Distraj ludoj. Ĉekomence rakonta rondo.

Junie 4: Gastprelego de Ruth van Puijenbroek-Walder: Survoje al la Jakoba Vojo. Ĉekomence rakonta rondo.

Julie 2: Ekskurso al la turo de Wil sur Hofberg, vizitado de la ŝtupo malavare pagita de Esperanto-Klubo Wil. (Se la vetero malbonos, nin invitos Leonie Senhauser.)

Aŭguste 18 dimanĉe: Tuttaga ekskurso: Heiden (AR) kaj Muzeo

pri Henry Dunant. Alveno kaj forveturo per la dentrada fervojo.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

(Adreso: Akazienstrasse 6, Poŝtfako 858, CH-8034 Zuriko)

Informojn pri la aktuala programo de Esperanto-Societo Zuriko vi trovos en la reto sub:

www.esperanto.ch/zuriko/programo.html

-oOo-

Ne nur adiaŭon, sed ankaŭ dankon



Claude Piron



Fotoj de Stefano Keller faritaj dum la SES jubileo en Rolle septembre 2003

La plifeliĉigisto

Mi ege amis lin, kaj mi diris al li tion.

Mi admiris ne nur lian talenton pri literaturo, sed ankaŭ lian grandan optimismon, kaj lian entuziasman sindonemon.

Mi malkovris esperanton danke al unu el liaj brilaj artikoloj, kiun mi hazarde legis en la reto.

Por mi li vere estis "plifeliĉigisto", kiel li ŝatis nomi sian profesion.

En la aŭtuno de 2006 mi konis lin persone ĉe la konversacia rondo, kiun li gvidis ĉiusemajne en Ĝenevo.

Dum la konversacio li diris, ke la sekvontan semajnon li estos ege okupita. Iu demandis lin ĉu tio signifas, ke li ne povos partopreni en la sekvont-semajna renkontiĝo? Li respondis: "Mi?! Malĉeesti la konversacian rondon?! Mi partoprenos en ĝi ĝis la fino de mia vivo, kaj poste mia fantomo partoprenos en

ĝi!" Kaj ni ĉiuj ridis, ĉar ni estis gajaj, kaj ni opiniis, ke tio okazos post longega tempo...

Mi ĉiam amos lin, kaj konsideros lin kiel imitindan modelon.

Luiza Carol, israelanino ofte ferianta en Svislando.

Li estos plu amata

La novaĵo trafis nin kiel fulmo en blua ĉielo ! Dum la ĵaŭda paroliga grupo en Ĝenevo Claude Piron estis tiel vigla kaj vivĝoja kun la partoprenantoj ! Ni ĉiuj multe ridis, ankaŭ pro gramatika problemo pri « esti amata / amita ». Ŝercante, iu diris ekzemple, ke post la morto Claude havu grandan monumenton, do li estos ne « amita » sed plu « amata » ! Li pripensis mallonge kaj li – same ŝercante – jesis, kompreneble. Ĉu pri la gramatika problemo ?

Kvin tagojn poste lia koro subite haltis dum joga trejnado, kaj Claude serene forpasis ! Nun la ŝerco finiĝis ! Terura ŝoko por ni ĉiuj !

Kia profunda doloro, por ĉiuj partoprenantoj de la ĵaŭda grupo, kia aflikto por liaj multnombraj amikoj en Svislando kaj en la esperantista mondo ! Claude estis grandanima, oferema kaj modesta. Lia radiado influis nin. Ja ni perdas valoran amikon kaj faman humaniston ! Claude estis ankaŭ sincera kristano.

Claude multe kontribuis al la disvolviĝo de esperanto dum sia vivo. Liaj eruditaj verkoj pri esperanto kaj lingvistiko estas gravegaj ! Ankaŭ menciindas la nombraj romanoj, rakontoj kaj eseoj, kiujn li sperte verkis esperant- kaj franc-lingve. Li ofte prelegis ne nur surloke sed ankaŭ en la tuta mondo, kaj ĉiutage li internacie retkorespondadis kun ĉieaj samideanoj.

Claude havis multajn talentojn en diversaj fakoj. Post sia laboro por Unuiĝintaj Nacioj kaj por Monda Organizo pri Sano kiel tradukisto, li specialiĝis pri psikanalizo, kiun li multjare instruis en la Ĝeneva Universitato.

Ja, ni priploras grandegan kulturan perdon !

Li estas kristano : do, adiaŭ Claude !

Kaj ni elkore kompatas Nicole.

Carlo Baumgartner kaj la ĵaŭda grupo.

Ni vere renkontis la homon Claude

En la jaro 1999, post la dua Esperanto-kurso de Lucien Dahan ĉe la Popola Universitato de Ĝenevo, mi sentis la bezonon plue kaj regule praktiki la lingvon. Ĉiusemajna paroliga kurso estus bonvena solvo, sed kun kiu ?

Lucien forte rekomendis Claude Piron.

Mi do telefonis al Claude, kiun mi tute ne konis, kaj klarigis mian peton. **Li senhezite tuj konsentis !** Post dek minutoj ĉio estis aranĝita, kaj ekde septembro 1999 ĝis unu semajno antaŭ sia morto Claude fidele kaj akurate venis Ĝeneven ĉiuĵaŭde.

Mi preskaŭ neniam devis kontakti lin ekster la kursoj por organiz-demandoj, ĉar ĉio kvazaŭ "fiziologie" disvolviĝis kiel la aŭtonomaj funkcioj en la homa korpo – kiel ekzemple la ritmo de la koro – ĝis lia koro ĉesis bati.

Claude – mi ofte miris pri tio – ŝategis tiujn renkontojn, malgraŭ la etkvalito de niaj lingvaj konoj, kaj niaj foje malrapidaj progresoj. Fakte li ege ŝatis la homan kaj koran -kvazaŭ familian- etoson, kiun ni ĉiuj kune kreis. Renkontiĝante preskaŭ ĉiusemajne dum 9 jaroj, ni kreis amikajn ligojn, multe pli fortajn, ol oni supozas.

Claude estis parolema kaj ni tiel multe lernis aŭskultante lin.

Lia babilemo ĉiam kaptis nian atenton kaj estis belega muziko por niaj oreloj.

Ni tamen ankaŭ parolis kaj elpensis diversajn paroligajn ilojn kaj ludojn, kiujn li ĉiam ĝoje akceptis. Claude ŝategis ĉiujn memorludojn, kiujn ni proponis...

La grupo restoracie celebris dufoje jare, kaj Claude aparte ŝatis tiujn festajn manĝojn (kiujn lia edzino Nicole ankaŭ ĝoje partoprenis).

Dum nia lasta kuna manĝo antaŭ kristnasko 2007, speciala ĝojo lulis niajn korojn : la saman matenon Christoph Blocher estis nereelektita ! **Eksplodo de gajeco neforgesebla !**

Ni ĉiuj konsciis pri la famo de Claude, sed li tiel simple kaj modeste prezentiĝis, ke ni vere renkontis la homon Claude. Kiel diris samgrupano Julien Nicolet : *"Mi tralegis la multegajn omaĝojn skribitajn sur la retpaĝo de edukado.net kaj ekkonsciis la egan gravecon de tiu simpla kaj afabla dorsosakulo en Esperantujo."*

"**Claude**, ni deziras al vi bonan vojaĝon. Lasu vian dorsosakon surtere kaj forflugu malpeze kaj larĝflugile lumen !

Ni ĉiuj dankegas kaj neniam forgesos vin, ĉar vi estas amata !..."

François Perret kaj la ĵaŭda grupo.

Lia laboro pri la lingvo estas pli konsiderinda, ol ĝi estas konsiderata

Li faris konsiderindan laboron por defendi esperanton kontraŭ misprezentoj. Kaj el pure esperantologia vidpunkto lia laboro pri la lingvo estas, laŭ mi, tre pli konsiderinda ol ĝi estas konsiderata. Persone mi ŝuldas al li multon.

Amike, Renato Corsetti/Korseti, Via del Castello, 1, IT-00036 Palestrina

La lasta projekto de Claude Piron en Romandio

Dum la jaro 2007 Claude Piron projektis prelegi en Laŭzano por vasta publiko kaj instruistoj. Dosiero estis sendita al la estrino de la vaŭda edukad-sistemo Anne-Catherine Lyon kaj la aparte efikaj argumentoj de Claude Piron ricevis pozitivan respondon.

Claude Piron elektis Dominique de Mestral, Nicole Margot, kaj min mem kiel sekretarion de la grupo, por kunpretigi strategion kaj alkroĉan programon. Por resumi tiun programon estis antaŭviditaj :

- Unue proponi al la Departemento organizi prelegojn de Claude.
- Due organizi staĝojn por vaŭdaj instruistoj kun la helpo de diversaj esperantaj instruistoj.
- Trie enkonduki esperanton en kelkajn elprovajn klasojn. En Britio oni spertas tion kaj la rezultoj jam konkludiĝas favore al esperanto kiel unua fremda lingvo.

Claude ĝojegis pri tiu projekto. Bedaŭrinde, forpreninta lin subite, la kruda sorto decidis alie. Ni perdis pli ol amikon.

En tiu projekto Claude Piron estis nia piliero, ĉefe pro siaj bonegaj prelegoj, kiuj allogis kaj sciis konvinki multajn personojn.

Lia preciza kono de esperanto kaj de diversaj lingvoj, ligita kun granda psikologia praktiko, multe helpis komprenigi niajn cerbajn mekanismojn pri lingvoj. Liaj tutmondaj vojaĝoj kiel tradukisto alportis ankaŭ elokventajn vidpunktojn pri lingvaj apartecoj kaj lia atesta kaj grava verko ***La Bona Lingvo*** alportis multon en la esperantan pejzaĝon.

Sed... sen li, ni devas reripensi la tutan aferon... Malfacilas prelegi je tiu alta nivelo kaj ni devas agnoski, ke en la nuna stato nia loka laŭzana klubo ne havas fortojn por tio.

Se oni fidas esperanton, se oni deziras servi honeste esperanton, oni devas esti kredebla. Iri antaŭen sen havi spertulegajn fortojn, tio signifas, ke esperanto ne havos krediton inter la vaŭdaj instruistoj, kaj perdos ĉiujn ŝancojn konatiĝi iam ajn.

Konklude ni certe sekvos la vojon, kiun Claude montris al ni kaj ne lasos tiun projekton morti. Ni konstruos la necesajn fortojn, la necesajn konojn por repreni vigle enmanen la esperantan flamon.

Por atingi tiun celon nur la diligenta lernado de la lingvo kaj la komunikado kun multaj fremduloj alportos tiun konon, kiu permesos al ni agi en tiu senco.

Ni kreis kun Claude : ***le C.R.I.E Comité Romand pour l'Information de l'Esperanto***, (KRIE) la Komitato Romanda por la Informo pri Esperanto kaj 4 tagojn antaŭ sia morto li sendis al ni tiun mesaĝon :

"Plaĉas al mi, ke nia komitato krias. Ĝi krias : Vekiĝu kaj lernu esperanton!"

Dumvive senĉese li semis grajnoj kaj nun la plej bela donaco, kiun ni povas fari al li, estos flegi kaj florigi tiujn semojn...

Endas do ekagi serioze favore al nia " Bona Lingvo", kiel diris nia ŝatata kaj bonkora Claude.

Elisabeth de Mestral en Etoy.

Li restas tamen kun ni

Jam de jaroj ni kunlaboris, kaj la rilatoj estis agrablaj. Mi invitis lin, kadre de la Kulturaj Kunvenoj de la Pariza Grupo de SAT en la Centro Pompidou la 3an de februaro 1980, kie li prelegis pri la temo *Pripensoj pri la kontraŭstaro al esperanto*.

Li faris konsiderindan laboron por defendi esperanton kontraŭ misprezentoj. Ni ŝuldas al li tre valoran franclingvan studon *Le défi des langues* [La defio de la lingvoj] aperinta en 1994 ĉe L'Harmattan, Parizo, kaj kiu kontribuis al antaŭenigo de la Lingvo Internacia. Ĝi aperis ankaŭ en la portugala en Brazilo.

Aperis de li ankaŭ pluraj romanoj sub la pseŭdonomo Johan Valano. *Gerda malaperis* estas sukcesa lernometodo sub formo de rakonto; ĝi aperis antaŭ ne longa tempo en Brazilo sub formo de filmo.

Multaj paĝoj, eĉ tuta libro, estus necesaj por prezenti tion, kion li faris, kiel li venis al esperanto, ktp...

Pri li rete konsultebblas :

<http://claudepiron.free.fr/> kaj

http://fr.wikipedia.org/wiki/Gerda_malaperis!

Claude Piron aŭskultebblas pri esperanto ĉe Youtube en la angla :

(unu video) ĉe :

http://www.youtube.com/watch?v=_YHALnLV9XU

en la franca (5 videoj) :

<http://www.youtube.com/watch?v=taLXSe4c498&mode=related&search>

<http://www.youtube.com/watch?v=amP-Vt-u0Q4>

<http://www.youtube.com/watch?v=tchzxH6hKRA&mode=related&search>

<http://www.youtube.com/watch?v=Tece443lSkY&mode=related&search>

<http://www.youtube.com/watch?v=71K-eriifj0&mode=related&search>

Per tio Claude Piron restas tamen, iel, kun ni.

Henri Masson, Francio.



Kelkaj libroj de Claude Piron, fotoj el la enciklopedio *Universalaj lingvoj en Svislando*.

Claude Piron aŭ Johán Valano

Namur 26 februaro 1931 - Gland 22-an de oktobro 2008

Post altaj komercaj studoj en Antverpeno, Belgio, kaj sia diplomiĝo en la traduklernejo de la Ĝeneva Universitato (1948-1953), Claude Piron unue laboris ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko kiel tradukisto el la lingvoj angla, ĉina, hispana, kaj rusa al la franca kaj kiel redaktoro-protokolisto (1956-1961). Tiam li jam rilatis kun la ĝeneva Instituto Charles Baudoin por studi psikologion, kaj tio certe instigis lin baldaŭ instaligi en Ĝenevo serve al Monda Organizo pri Sano (1961-1971), por kiu li aktivis ĉefe en orienta Azio, en la pacifika regiono kaj en Afriko. Tiel ekde 1966 kaj ĝis 1975 li povis surloke trejniĝi kiel psikanalizisto kaj psikoterapiisto en la Instituto Charles Baudouin.

Estas tiam, ke ni reciproke konatiĝis favore al poresperantaj aktivecoj. Claude Piron knabe estis eklerninta esperanton en 1943. Poste, ĉirkaŭ 1957, dum sia laboro en Novjorko li kunfondis kaj prezidis Esperanto-Klubon por funkciuloj de Unuiĝintaj Nacioj. Dum la 60aj jaroj li deĵoris kiel reprezentanto de UEA ĉe UN en Novjorko kaj Ĝenevo kaj rolis kiel UEA-delegito en Ĝenevo. Li aktivis en la ĝeneva esperanto-grupo La Stelo, en SES kiel redaktoro de *Svisa Espero* de 1963 ĝis 1966, en Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds kaj ties komisiono Esperanto Lernejen, kiu en 1975 publikigis lian malferman leteron al la direktoro de Monda Organizo pri Sano, per kiu li rekomendis esperanton kiel taŭgan solvon de la lingva kaj financa problemaro de tiu organizo. Li kunfondis kaj poste prezidis en 1979 la Internacian Ferian Altlernejon de KCE kaj samjare funkciis kiel rektoro de la Somera Universitato en Esperanto dum ties 32a sesio okaze de la 64a Universala Kongreso en Lucerno. En La Chaux-de-Fonds li ankaŭ aktivis kadre de CDELI ne nur kiel konsilanto, sed ankaŭ kiel regula donacanto de libroj kaj arkivaĵoj. En 1981 kaj 1983 li instruis esperanton en la sanfranciska Ŝtata Universitato kadre de someraj kursoj.

Ekde 1971 Claude Piron komencis labori kiel privata psikoterapiisto ne-medicina, kaj ĉar li loĝis familie en la komunumo Coppet, lia tuta familio svisiĝis en 1978 kiel vaŭdaj civitanoj kaj sekve li estis agnoskita en sia psikiatra funkcio en 1988 fare de la Departemento pri Sano de la Vaŭda Kantono. De 1973 ĝis sia emeritiĝo en 1994 li ankaŭ instruadis en Ĝenevo kiel docento en la Psikologia kaj Edukscienca Fakultato de la Ĝeneva Universitato kaj en la Internacia Instituto de Psikanalizo kaj Psikoterapio, interalie pri la temoj emocia vivo, strukturiĝo de la personeco kaj disvolvo de la konaj funkcioj. Ĉar li ne kaŝis sian praktikon de esperanto, tial en tiuj universitataj medioj li havis plurfoje la okazon atentigi pri la avantaĝoj, kiun esperanto alportas profite al pli rapida kaj pli efika instruado de la naciaj lingvoj. Tion ĉi li faris kunlabore kun KCE kaj ties komisiono Esperanto Lernejen, kiu publikigis plurajn el liaj demonstraj dokumentoj. Estis por Claude Piron ege streĉa laborperiodo, ĉar li estis ofte petita por gvidi seminariojn kaj staĝojn aŭ por prelege kontribui en ili, ĉu en universitataj medioj, ĉu en esperanto-rondoj.

Kiam iliaj tri gefiloj unu post la aliaj estis forlasintaj la familian hejmon de Coppet, la emeritoj Claude kaj Nicole Piron decidis en 1999 translokiĝi en malpli grandan hejmon senĝardenan en Gland. Kaj estas en tiu vaŭda vilaĝo, ke Claude plu aktivis kiel psikoterapiisto ĝis sia subita morto, ĉefe okupiĝante pri la trejnado de junaj psikoterapiistoj-psikanalizistoj, prelegante kaj gvidante staĝojn aŭ terapiajn grupojn.



Foto de Claude Gacond je la 18-a de aprilo 1971 farita en Prilly konklude al semajnfino organizita de Marie-Louise Münger-Ackermann (side dekstre apud sia edzo) kaj Nicole Margot (stare maldekstre), en kiu Claude Piron (maldekstre) instruis pri la poeziaj ebloj de esperanto. La aliaj fotitoj estas Françoise Badoux, Gabrielle kaj Andrée Gacond, Raymond Zoller kaj gesinjoroj Hans-Werner Grossmann.

Claude Piron akiris renomon pro siaj oftaj prelegoj en esperantaj aŭ en universitataj fakaj medioj, sed precipe kiel verkisto kaj aŭtoro de pli ol 20 originalaj libroj en esperanto, kaj pro aliaj gravaj publikigoj en kaj pri la lingvo internacia li reale mondfamiĝis. Sub la pseŭdonomo **Johán Valano** li aperigis inter 1976 kaj 1982, ĉefe en la eldonejo Stafeto Antverpeno/La Laguna, kvin krimromanojn en la fama 'Ĉu-serio', poste sekvis ankoraŭ la novelaro *Ĉu rakonti novele?* Alia famekonata teksto de Piron eldoniĝis sub la titolo *La Bona Lingvo* en 1989. Claude Piron gajnis plurajn premiojn: En 1955, kadre de la Belartaj Konkursoj de UEA, li ricevis la poezian premion, kaj en 1993 sekvis la Premio Deguĉi. Lia ĉefa nacilingva kontribuado rilate al la monda lingva problemo kaj esperanto estas certe la verkego *Le défi des langues, du gâchis au bon sens*, L'Harmattan Paris 1994. La redakcion de la dua eldono de *Plena*

Ilustrita Vortaro de Esperanto, aŭ PIV, Piron konsilis rilate al la psikologia terminologio.



Fotis René-William Perrenoud la 16-an de februaro 1975. Inaŭguro de la sekretariejo de KCE ĉe strato Postiers 27 en La Chaux-de-Fonds enkonduke al Ĝenerala Asembleo decidinta la fondon de Gastejo Edmond Privat. Claude Piron staras prelegonte. Stare la aliaj estas Claude Gacond, Jimmy Rivière, Istvan Morocz kaj Andres Bickel, kaj side Walter Kobelt.

Fakte Claude Piron ĉiam elpaŝis kiel tre engaĝita pledanto favore al la planlingvo esperanto, konsiderante ĝin kiel verŝajna sola racia alternativo al la lingva kaoso reganta en la internaciaj organizaĵoj, kies situacion li bone konis de interne. Kiam li prelegis favore al esperanto, tiam li aktoritis kiel arda advokato, interesa rakontanto, fakulo kun multaj teoriaj konoj kaj praktikaj spertoj pri psikologio, pri mondlingvaj problemoj kaj pri la fenomenoj kondukantaj al interpopolaj konfliktoj. Tiurilate li estas vera posteulo de Edmond Privat, kiun en Romandio li efike anstataŭis favore al pledado poresperanta. Kiel Privat, la aŭtoro de *Esprimo de sentoj en esperanto*, Piron kapablis priskribi lingvajn fenomenojn sen simplismo. Kaj kiel lia antaŭulo li estis konvinkita pri la estonta rolo de esperanto profite al kreo de pli homa homaro, sed, ankaŭ kiel Privat, li vigle konsciis, ke ankoraŭ longe daŭros la mondlingva kaoso, kiun ĵaluze kultivas la grandaj imperiaj ŝtatoj profite al propra politika regemo. Kiel lia antaŭulo Piron konsciis, ke fakte esperanto estas pli ol nura lingvo, sed ankaŭ esprimilo de humanismo interhoma psike paciga. Sed li konsciis, ke ankoraŭ longe daŭros, ĝis kiam la naciistoj akceptos revizii siajn ŝovinismojn profite al reale tuthomara mondpercepto.

Claude Piron, ankaŭ kiel Privat, nelacigeble plenumis sian laboron kun konscio, ke “li bezonus almenaŭ tri paralelajn vivojn por fari ĉion, kion li devus aŭ volus fari.” Lia laborkvieto atestas, ke li plene konsciis, ke la morto ĉesigos lian aktivecon, antaŭ ol ĝi estos reale plenumita. Kiel Privat li certis, ke aliaj daŭrigos la interrompitan laboron. Estas fakte en la sama urbo Gland, ke ambaŭ forlasis nian mondon, kiun ili celis plibonigi : la aŭtoro de la pedagogia verko *Karlo* en 1962, tiu de *Gerda malaperis* en 2008. Per siaj romanetoj por komencantoj ili plue faciligos al miloj da homoj la eklernon de la zamenhofa lingvo, vekante en ili entuziasmon por ĝiaj realaj kvalitoj. UEA prave listigis lin en 1998 al la listo de siaj honoraj membroj.



Foto de Andrée Gacond farita la 20-an de septembro 1982 dum promonado sur monto Pouillerel super KCE konklude al semajnfina kurso de Claude Piron pri la temo agresemo kaj konfliktoj. Maldekstre Claude Piron diskutanta kun Claude Gacond. Dekstre paŝas Nicole Piron, kaj centre Lilli Giloteaux kaj ties filino.

Por ĉiu homgrupo funebro havas konsekvencojn malstabiligajn, kiuj povas konduki ĉu al perdo de kuraĝo kaj al pesimismo, ĉu kontraŭe al plivigliĝo cele al transpreno de la interrompitaj aktivecoj, kiujn morto paneigis. Sekve al la subitaj malaperoj de Edmond Privat kaj Charles Ecabert en aŭgusto kaj decembro 1962 mi devis urĝe transpreni respondecojn, kiuj certe ŝanĝis mian profesian orientiĝon ĉesigante mian natursciencan fakiĝon profite al kleriĝo esperantologia, kiun mi metis ne nur je la servo de la esperanto-programo de la tiama Svisa Kurtonda Radio, sed ankaŭ al la kreo de la arkivejo CDELI kaj de la kursejo KCE, kaj ankaŭ favore al eldonaj agadoj en kunlaboro kun Henri Vatré

kaj Juan Régulo-Pérez. Mi estas konvinkita, ke nun same novaj fortoj leviĝos por senpaneigi esperanton almenaŭ en Romanda Svislando restinta kulture optimisma. La sekva traduka eksperimento fare de nova esperantisto jam atestas pri ekmastrado de la lingvo fare de novuloj. Bedaŭrinde Claude Piron ne povos alporti sian kritikan konsiladon de tradukisto al Dominique de Mestral. Sed la atenta trastudo de lia verkaro komencita per la analizo de *La bona lingvo* restos helpo al majstra uzo de la ŝatata lingvo.

Claude Gacond

El Louis Aragon esperantigo de Dominique de Mestral

Louis Aragon, surrealista poeto franclingva, troviĝis dum la dua mondmilito de 1939-1945 kun Elsa Triolet inter rezistantoj. Tiu lia poemo **C** aludas lian amon al Elsa, la belecon de Francio, kaj la Forfuĝon de majo 1940.

Ĉiuj rimoj de lia poemo **C** franclingve havas ununuran rimsonon : **se**. Mi do ne kapablis imagi, ke eblus esperantigi ĝin kun ununura sama rimo ! Sed vidu, nia genia poeto Dominique de Mestral sukcesis respekti la 8 silabojn de la versoj kaj ties rimon **se** !!! Ne kredeble, ĉu ne !

Mi do nepre volis komuniki tion al vi !

Nancy Fontannaz

"C"

J'ai traversé les ponts de Cé
c'est là que tout a commencé
une chanson des temps passés
parle d'un chevalier blessé
d'une rose sur la chaussée
et d'un corsage délacé
du château d'un duc insensé
et des cygnes dans les fossés
de la prairie où vient danser
une éternelle fiancée
et j'ai bu comme un lait glacé
le long lai des gloires faussées
la Loire emporte mes pensées
avec les voitures versées
et les armes désamorçées
et les larmes mal effacées
ô ma France, ô ma délaissée
j'ai traversé les ponts de Cé.

"SE"

Transiris mi la pontojn "Se"
ek-spertis ĉion imprese
kun inta kanto enmense:
kavalir' rajdas vundlace
iu roz' dormas sur ŝose'
korsaĝ' kuŝas tie dise
kastelduk' agas sence
en fosaĝ' as cignoj pace
sur herbej' iradas dance
iu fianĉin' senĉese
kiel lakton mi nejese
trinkis glorpoemon mise
Luar' min forportas pase
aŭtojn kiuj is renverse
armilojn senpovajn dise
kaj larmojn pluajn sukcese
Franci', statas vi forlase
transiris mi la pontojn "Se".

Redaktas : Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9300 Wittenbach,
rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Claude Piron pri psikologiaj aspektoj de la ŝanĝoj en la mondo kaj pri esperanto

- Valerija Vaŝenina,
Konstantin Aleksandrov

En la rusa gazeto "La Nova Homaro" aperis unu el la lastaj intervjuoj kun Claude Piron, kiu delikate penas siamaniere ekspliki la ŝanĝojn en la mondo.

– Kial nuntempe, nome en la 20a jarcento, aperis tioma postulo de psikoterapiistoj? Kiujn ŝanĝojn de la socio respegulas tia evoluo de psikologio kaj psikoterapio, esence, de la scienco pri animo?

La kaŭzoj estas multaj kaj kompleksaj. Unu estas, ke la ritmo de la vivo akceliĝis, kompare al tio, kio ĝi estis antaŭe dum jarcentoj. Oni postulas, ke homoj pli rapide laboru, pli rapide transiru de loko al loko, pli rapide solvu problemojn, ktp. Tio estigas streĉiĝon en la nerva sistemo, pri kiu psikoterapio povas helpi.

Alia kaŭzo estas, ke multo ŝanĝiĝis en la socio, ekzemple la rolo de la virinoj; la proporcio de geedzoj, kiuj ĉesas voli vivi kune; reklamado, kiu celas adoleskantojn kaj infanojn kaj igas ilin postulemaj;

malpliigo de la kapablo – aŭ volo – elporti frustrajn; konfuzo en kampoj, kie antaŭe regis stabileco, kiel la religia kaj vivkoncepta; perdo de certecoj rilate al la maniero eduki; kaj multaj aliaj faktoroj.

Indas diri ankaŭ, ke la multaj horoj dediĉataj al televido tro postulas de la nerva sistemo, ĉar la spektanto restas senmova, sed kun sensoj elmetataj al konstanta kaj rapidege ŝanĝiganta stimulado. Tiel estiĝas streĉiĝo, kiu ne povas eliri el la korpo en la natura maniero, per moviĝo aŭ korpa ago, aŭ per simpla ripozo sen sensa stimulado aŭ simple per konversacio aŭ ludo. La rimedoj tradicie uzataj por ekvilibrigi la nervan funkciadon, kiel silento, trankvilo, mallumo, malrapidritma neforta muziko, soleca meditado kaj similaĵoj ne plu allogas.

Sed certe unu el la plej gravaj faktoroj en la postulo pri psikoterapio estas, ke homoj malkovris, ke multo antaŭe rigardata kiel fatala – sento de malfeliĉeco, interpersonaj konfliktoj, ripetado de malsukcesoj – fakte ne estas fatala, sed radikas en la maniero, laŭ kiu la individua psiko

disvolviĝis kaj funkcias, kaj ke psika funkciado povas iĝi multe pli feliĉiga per psikoterapio, ĉar tiu helpas konsciiĝi pri la fuŝoj, kaj tiujn forpreni.

– *Kio estas animo – ĉu tio estas personeco de homo, liaj kutimoj, intelekto, eduko aŭ io pli granda? Kie ĝi troviĝas?*

Por homo kun religia kredo, animo estas la parto de homo, kiu postvivas la morton. Por materiisto, animo estas io, kio ne ekzistas. Por sciencisto, ĝi estas koncepto sen objektiva enhavo, eble interesa el literatura vidpunkto, sed tro malpreciza por esti utile uzata. Por aliaj, ĝi estas ĉefe la loko de sentoj.

Multaj personoj uzas la vortojn “animo”, “psiko”, “menso” kaj “spirito” sen tre bone distingi ilin. Plej facile estas difini *menson*. Tiu estas la parto de vivanta estaĵo, kiu pritraktas la informojn, ne nur konscie, sed ankaŭ – grandparte – nekonscie. “*Spirito*” estas la malo de materio, ĝi rilatas al sfero malsama ol tiu de menso, al io, kio troviĝas trans la materia vivo. Kalkuli estas mensa ago, preĝi estas ago spirita. *Psiko* estas tiu parto de vivanta estaĵo, per kiu ĝi sentas, konas, imagas, agas kaj reagis, strebas, volas, ktp. Iusence, estas la faka vorto por tio, kion oni ĝenerale nomis animo, sed animo estas pli vasta koncepto. Krom la supre citita senco, ĝi signas ankaŭ kulturan etoson, ion malfacile difineblan, sed kiu vibras profunde en ni kaj iom difinas nin, kiel en la esprimo *rusa animo*.

Por mi, ĝi estas ankaŭ tio, en ni, kio vivigas korpon. Korpo estas ma-

terio, sed se ĝi vivas, ĝi ne estas inerta, ĝi estas tute malsama ol maŝino, ĝi estas aranĝo de molekuloj, jes ja, sed tiu aranĝo konservas sin mem malgraŭ la konstanta ŝanĝiĝado, riparas sin mem kaj prizorgas mem sian pluekziston, krome ĝi sentas, suferas, ĝojas.

Kompreneble, ne estas vere klaraj limoj inter tiuj konceptoj, kaj ili ne situas samnivele. Menso estas inkluzivita en psiko, psiko do estas pli ol menso. Por mi estas distingo inter psiko kaj spirito, sed ekzistas vasta zono, kiu apartenas al ambaŭ. Kiam mi traktas pacienton, mia agado tiom koncernas ties animon kaj spiriton, kiom ties menson kaj emocian-sentan psikon.

– *Do kio estas homa personeco?*

Personeco estas, je iu momento, la rezulto de ĉiuj influoj, kiuj faris, ke persono estas tia, kia ĝi estas, kaj ne alia. Tiuj influaj faktoroj estas tre diversaj: la genetica heredaĵo, la konduto rilate al ni de niaj gepatroj kaj aliaj familianoj, de la socio (lernejo, amaskomunikiloj, militservo, influaj personecoj renkontitaj, ktp.), decidoj, kiujn ni faris, kiam ni troviĝis antaŭ elekto (ekzemple la decido ekfumi povas havi gravajn konsekvencojn, kiujn oni evitus, se, ĉiufoje kiam aliaj instigas nin fumi, ni reagus rifuze). Kiam ni elektas inter du aŭ pluraj eblaj decidoj, ni ofte faras tion sen vere pripensi, tamen ni elektas, kaj tiuj decidoj, unu post la alia, konstruas nian personecon kaj povas havi gravan signifon por la sekvo de nia vivo. Al ĉio ĉi, por esti kompleta, necesas aldoni la faktorojn, kiujn ni ne konas, ekzemple antaŭan vivon, se

estas io vera en la teorio pri reenkarneigo, influon de spiritoj, se estas io vera en la tezoj de spiritismo, influon de astroj, se estas io vera en tezoj astrologiaj. Kie troviĝas animo? Mi dirus en nia korpo, aŭ tra nia tuta korpo. En multaj kulturoj, ĉefe afrikaj kaj aziaj, nia korpo estas konceptita kiel kovrita de – aŭ interplektita kun – alia “subtila” korpo, alia tavolo, kiu ne estas rekte perceptebla al niaj sensoj, kaj tamen estas materia, sed kunmetita el multe pli delikata, fajna materio, ol niaj okuloj povas vidi. Se tio ekzistas, eble tio estas animo. En nia socio, multaj dirus, ke la animo estas en nia cerbo. Estas fakto, ke multaj funkcioj tradicie atribuitaj al la animo havas sian komand- kaj informcentron, aŭ almenaŭ respegulaĵon, en la cerbo.

– *Laŭ statistiko, deprimo estas ĉefa malsano de la 20a jarcento. La homoj vivas “en si”, posedas grandan egoismon. De kie ĝenerale aperas deprimo? Ĉu eble tio signifas, ke homoj devas eliri el sia “ŝelo”, unuiĝi kaj iĝi apude unu al la alia? Se jes, kiel ni povas tion fari?*

Deprimo parte fontas en la nerva trostreĉo, pri kiu mi parolis komence. Troa, malekvilibra stimulado de la nerva sistemo kondukas al deprimo. Homoj niatempaj ĝenerale ne respektas la regulojn de nerva higieno, kiu postulas alternon da agado kaj ripozo, de sonoj kaj silento, de lumo kaj mallumo, de laboro mana kaj mensa, ktp.

Sed ankaŭ multaj aliaj faktoroj intervenas. Ekzemple, estas normale trapasi deprimfazon post la morto de iu intense amata, aŭ post perdo de

libereco aŭ de normala vivo (kiel okazas, kiam milito trafas la lokon, kie ni vivas). Sed ofte deprimo estas ligita ankaŭ al perdo de senco.

En la pasintaj jarcentoj, vivo havis sencon por ĉiuj, kiuj kredis je vivo postmorta. Oni vivis por esti digna eniri paradizon, kaj la vojo tien estis klare markita kaj konata, kaj haveblis rimedoj (ekzemple konfeso) por ripari la fuŝojn survoje faritajn.

Nun, tre ofte, homoj ne scias, kiun sencon ilia vivo havas aŭ havu. Ili perdis kontakton kun la sencdona fonto, kiu vivas profunde en ilia psiko aŭ animo. Por trovi tiun sencon, oni devas silenti, ĉesi agi, aŭskulti la plej-enon, eniri profunden en si, malfermi sian animon, se tiuj esprimoj havas por vi signifon.

La moderna socio favoras la malon de tiuj agadoj: ĝi ŝatas bruon, konstantan aktivecon, supraĵajn pensadon kaj interesojn, koncentriĝon al materiaj posedaĵoj aŭ al komforto kaj distraĵoj, aŭ al valorigo de la ego, kaj ĝi malŝatas aŭskultadon de aliaj aŭ de si mem, timas enprofundiĝi kaj vere fronte aliri la problemojn de la realo. Ĝi favoras fuĝon for el la problemaj situacioj kaj for de si mem, de la propraj veraj demandoj, kiel la senco de vivo kaj morto. Alkoholismo estas unu el la oftaj rifuĝejoj, en kiujn homoj fuĝas el siaj problemoj kaj el la konscio de ties ekzisto. Ĝi ofte estas la ekstera manifestaĵo de deprimo.

Estas paradokse, ke, se oni prenas la tempon eniri profunden en si por tie trovi la sencon, oni malkovras, ke tiu senco postulas, ke oni ne izolu sin. Sed tiel estas. Por ke nia vivo havu sencon, necesas aliro al la aliaj,

interesiĝo pri ĉio kaj ĉiuj aliaj ol ni mem. Kompreneble, ni estas limigitaj kaj do ne povas serioze interesiĝi pri ĉiu konato aŭ nekonato, sed profunda kunvibro kun ĉiu, tre intensa se temas pri iu vere proksima, pro neceso tute malintensa se temas pri iu malproksima, estas parto de la senco de la vivo, kiu protektas kontraŭ deprimado.

Deziro kompreni la mondon kaj la homojn, deziro, ke ili kresku laŭ sia naturo, respektate, deziro, ke ili uzas sian kreaĵon potencialon kaj tiel feliĉigu sin kaj la aliajn, deziro rilati kun ili se ili tion permesas (trudi ĉiam estas io malbona), tiuj estas deziroj, kiuj rilatas al la profunda senco. Notu, ke la rilatado povas esti – en esceptaj kazoj – sen rekta komunikado. Malmultaj neordinaraj personoj povas fizike izoli sin (kiel iuj saĝuloj en Himalajo, aŭ monaĥoj en iu forperdita monaĥejo) kaj tamen ne esti anime izolitaj, ĉar ili konstante preĝas por la aliaj, kaj do tiuj situas centre de iliaj priokupoj. Kio deprimas, aŭ estas efiko de deprimado, estas koncentriĝo al si je supra nivelo (plezuro, reputacio, materiaj aferoj, zorgo pri la signoj de maljuniĝo aŭ la maniero vesti sin, ktp).

Kiel ni povas eliri el nia ŝelo kaj unuiĝi kun la aliaj, vi demandas. Mi respondas: prenante serioze nian plej profundan naturon, kiu instigas nin al rilatado. Se tiu ne ekzistus, lingvoj ne ekzistus. Kiaĵo infanoj ekskursantaj en aŭtobuso troviĝas samnivele, sur la ŝoseo, kun aŭtobuso venanta el la kontraŭa direkto, ili spontane mansvingas. Tiu baza bezono saluti estas esprimo de tiu profunda naturo nia, kiu estas direkt-

ita al la aliaj, ne nur al homoj, cetere, sed ankaŭ al bestoj, plantoj, objektoj, ideoj, muzikoj, artaĵoj kaj la aliaj milmil mirindaĵoj de nia universo.

Por eniri en nian plej profundan naturon, necesas dediĉi al tio tempon, igi sian koron (animon, menson, psikon) kvietan, kaj “eniri la enan silenton”, kiel diris pacientino mia. Religiemuloj povas instrui sian animon serĉi kontakton kun Dio aŭ iuj sanktuloj. Ateistoj povas instrui sian “mion” (egoon), aŭ la nekonscian parton de si, serĉi tion, kio, en ili, estas plej baza, plej kerna, plej plena je potencialaj, ankoraŭ nedisvolvitaj fortoj.

– *Kial vi verkas en Esperanto?*

Mi verkas en Esperanto, ĉar mi ŝatas tiun lingvon. Ĝi estas mirinda materialo por arte krei. Esperanto estas por mi kiel marmoro por skulptisto, orkestro por komponisto. Mi verkas ankaŭ, ĉar mi deziras pliriĉigi ĝian kulturon, mi ne scias, ĉu mia kontribuo havas valoron, sed almenaŭ mi faras ion tiudirekte. Mi verkas en Esperanto krome, ĉar estas la sola lingvo, en kiu mi kapablas verki, kiu transpasas la limojn de difinita kulturo.

Mi ne povus verki angle aŭ ruse, kvankam mi iugrade kapablas uzi tiujn lingvojn. Sed ne literature. Por literature verki, oni devas regi la materialon je tre alta nivelo, kiun mi neniam atingos en fremda lingvo alia ol Esperanto. Se mi ne uzus Esperanton, mi do estus kondamnita verki nur por franclingvanoj. Estas entuziasma plezuro por mi ricevi leterojn aŭ retmesaĝojn de legintoj el Mongolio, Togolando, Brazilo, Finn-

lando aŭ Patagonio, kiajn mi ne ricevus, se mi verkus en alia lingvo.

– *Ĉu la homaro bezonas komunan unuigan lingvon? Por kio?*

Mi ne dirus, ke la homaro bezonas komunan lingvon. Ĝi vivas jam jarmilojn sen io simila kaj tiu manko ne malhelpis ĝin vivi. Ne temas do pri nepra bezono. Sed mi opinias, ke homoj estas genetike programitaj por ĝi.

Se infano, kiu ne estas surda kaj havas perfekte funkciajn parol-organojn kaj cerbon, tamen atingas la aĝon de ses jaroj neniam dirinte unu vorton, ĉiuj pensas: “Estas io nenormala”, kaj oni serĉas iun, kiu povos kuraci ĝin. Tio signifas, ke oni rigardas normala povi komuniki kun la ĉirkaŭuloj.

Simile, estas normale povi komuniki kun la aliaj, eĉ se ili apartenas al alia nacio. Nia cerbo estas programita por tio. Estas do io nenormala en la ĝenerala nekapablo mondscale interkompreniĝi. La sola kaŭzo, pro kiu la plimulto el la homoj ne sukcesas plenumi tiun genetikan programadon je internacia nivelo, estas, ke ili elektas malĝustan lingvon. Tion pruvas Esperanto.

Komparu anglalingvan konversacion inter mezumaj brazilano kaj ruso al simila konversacio kun similaj personoj en Esperanto. La unuaj pene aŭ apenaŭ interkompreniĝas, kvazaŭ la lingvocentro en ilia cerbo estus difektita. La duaj normale interkompreniĝas, same bone kiel se ili uzus la gepatran lingvon. Kiam Esperanto estas la komuniklingvo, malaperas ĉiuj simptomoj de senlingveco (faktermine *afazio*), kiujn oni povas observi, kiam mez-

umaj malsamlingvuloj provas interkompreniĝi alimaniere, ekzemple per la angla. Ke la unuaj dediĉis ses aŭ sep jarojn al la studo de la angla, dum la aliaj dediĉis al Esperanto nur kelkajn monatojn, ankaŭ montras, kie respektive situas normaleco kaj nenormaleco.

– *Esperanto unuigas homojn. Sed plejparte (mi juĝas laŭ mesaĝoj de amaskomunikiloj) la pinto de popularereco de Esperanto pasis, kaj nun oni komprenas ke ĉiuj homoj ne povas paroli en tiu lingvo. Kio, de via vidpunkto, povas unuigi ĉiujn homojn, se tion ne sukcesis fari tia belega metodo – la komuna lingvo? Pro kiu celo ili povas unuigi aŭ pro timo de kio?*

Mi opinias, ke la tago venos, kiam preskaŭ ĉiuj povos interrilati per Esperanto. Estas multe tro frue por juĝi ĝin malsukcesa, des pli ĉar, dank’ al Interreto, ĝi nun progresas ege rapide. Estas historie nevere, ke Esperanto iam estis sukcesa kaj poste malprosperis, aŭ ke ĝi esprimas nerealigeblan revon. Tio estas impresita kreita de la amaskomunikiloj, kiuj mencias ĝin nur de tempo al tempo, laŭ hazardaj okazaĵoj, ĉar ĝi neniam konsistigas “informon”, “novaĵon”. Kial oni parolus pri arbo, kiu trankvile kreskas? Tio ne interesus la publikon. Simile, oni preter-silentas, ke Esperanto neniam ĉesis diskrete disvastiĝi, ek de kiam ĝi aperis sur la monda scenejo.

Krome, la homoj, kiuj forĵetas Esperanton, tion ĉiam faras, ĉu pro miskompreno – ili imagas, ke ĝi celas anstataŭi la naciajn lingvojn, kiujn, prave, ili ne volas perdi – ĉu antaŭ ol vere informiĝi pri ĝi, pri

ĝiaj kulturo, potencialo, praktika kaj psikologia utileco. Se oni komparas ĝin kun la aliaj rimedoj aplikataj por interpopole komuniki – angla lingvo, tradukado kaj interpretado, balbutado de fuŝe regata lingvo kun multaj gestoj, ktp. – trudiĝas la konkludo, ke la rilato inter efikeco kaj investo (mona, tempa, pena) estas tiel favora al ĝi, ke estas tute certe, ke iutage ĝi estos universale uzata, same kiel persono, kiu, en la dekunua jarcento, komparus la romajn ciferojn kun la arabaj (fakte hindaj), povus kun certeco diri, ke iutage la socio transiros el la romaj ciferoj – aŭ el la greka kaj hebrea manieroj noti la nombrojn – al la arabaj, tiom pli praktikaj. Homaro rezistis dum tri aŭ kvar jarcentoj, sed finfine la plej oportuna solvo venkis.

Prave vi uzis la vorton “timo”. Kio povas unuigi la homojn, estas sukcesi superi la timon (kaj, paren-teze, tio estas unu el la funkcioj de psikoterapio). Ili povas unuiĝi, ĉar estas bone esti kune. Ekzistas en Esperanto mirinda vorto: *amikumi*. “Mi venas al kongresoj por amikumi”, foje diris al mi kolego. Estas agrable senti sin ĉirkaŭita de amikoj, travivi amikan etoson, senti amikecajn sentojn. Homoj ŝatas esti kune. Sed por povi plenumi sian amempotencialon, necesas superi la timon.

Iu alia estas, komence, io nekonata. En la profundo de la homa psiko estas konflikto inter du malsamdirektaj emoj. Unu instigas nin eviti nekonataĵojn, ĉar ili riskas atenci nian senton pri sekureco. Kio sekurigas nin, estas tio, kio estas konata, familiara. Sed fundfunde de ni, estas ankaŭ la mala tendenco, la

inklino travivi ion novan, esplori, malkovri nekonatajn teritoriojn, pliampleksigi sian universon, ktp. La streĉiĝo inter tiuj du bazaj inklinoj estas la fundamento de la dinamiko homa. Ni samtempe havas en ni forton, kiu diras: “Restu ĉi tie, ne foriru, ne provu ion nekonatan, estas tiel bone rutini en familiara kadro kaj ne devi adapti sin al io nova!”, kaj forton, kiu diras: “Iru esplori, iru malkovri, iru ĝui, uzu vian potencialon, renkontu aliajn, kaj se necesos batali por atingi vian celon, ne timu la batojn!” La kontraŭstaro al Esperanto fontas el la unua tendenco kaj la intereso pri la lingvo el la dua.

– *Ĉu ĝenerale ekzistas io simila inter ni, la homoj el la tuta mondo? Kio?*

La granda problemo de multaj homoj estas, ke oni ne instruis al ili pensi laŭ du malsamaj aksoj. Tamen por scii, ĉu estas tiom da akvo en alta, longa, mallarĝa glaso kiom en la apuda larĝa, malalta, mallonga, vi devas pensi laŭ du aksoj, nome, ke, kio estas perdita laŭ la vertikala akso, tio estas gajnita laŭ la horizontala. Simile, por ĝuste taksii homaron, vi devas samtempe pensi laŭ la akso “simileco” kaj laŭ la akso “malsameco”. Ni ĉiuj estas malsamaj.

Ek de kiam homo aperis sur nia planedo, antaŭ jarmiliono aŭ pli, estis neniu kun la samaj fingrolinioj, la sama voĉo, la sama vizaĝo, la samaj gustoj aŭ pensmaniero kiel vi. Inter tiuj multaj miliardoj da homoj vi estas unika, kaj ankaŭ mi. Tio estas la ega malsameco. Sed tamen, se escepti kelkajn bedaŭrindajn fuŝojn de naturo, gravegajn por la koncernaj familioj, sed statistike sen-

signifajn, ĉiu el ni havas unu nazon, du orelojn, du manojn kun po kvin fingroj, ĉiu el ni havas la potencialon por paroli, ami, pli malpli arte krei, senti, solidari, kunlabori kaj mil aliaj eblaj faroj komunaj al la tuta homaro. Tio estas la akso pri simileco. Ĝuste la kombino de la du aksoj igas la vivon mirinda. Ni ĉiam povas renkonti iun, kun kiu ni havas ion komunan, kaj tamen tiu "iu" estos

interesa, amebla, konebla, ĉar li aŭ ŝi estas radikale malsama ol ni, ŝi aŭ li ne estas kopio de ni. Paro plej bone funkcias, se ambaŭ havas komune unu manieron aliri la realon, sed ankaŭ unu tute malsaman. Esti similaj laŭ unu vidpunkto, sed komplementaj laŭ la alia, estas la formulo por feliĉi. Kio validas por paro, tio validas ankaŭ por la tuta homaro.

(*Aperis rete en "Libera folio".*)

Du poemoj de Johán Valano

GEMELOJ

*Mia malĝojo kaj mia ĝoj',
paro ĝemela vi tenas vin kune
tra mia vivo, en mia kor',
kaj vi prilumas jen nigre jen sune
la tutan iron de mia voj',
glata ĉe rido, kruta ĉe plor'.*

*Peza turmento, mia malĝoj',
kial animon vi tordas misforma,
ke ĝi vagadu en agoni',
kripla hundaĉo de nokto sendorma,
lame pelata, hurla ĉe boj',
amsoifanta orfo de Di' ?*

(*El "Malmalice", IEM, Vieno 2001.*)

*Kaj mia lumo, vi mia ĝoj',
kial vi ĉion ordigas serene
kiam la vivo ĝermis el mort'
kaj vi aperas diskrete kaj bene
ĉe mia pordo, sur mia sojl',
ore lumanta fonto de fort' ?*

*Kial malĝojon, vi mia ĝoj'
provas brakumi per gesto gastama
kiel bubaĉon kisas patrin' ?
Ĉu volis Dio ke lum' via flama
iĝu kun ombro viva aloj'
ĉar tiel lernas frukti l'anim' ?*

SEZONOJ

*Jen floro
oras :
printempa
tempo.*

*La suno
junas :
trankvila
brilo.*

*La vento
pentas :
trablova
movo.*

*La neĝo
reĝas :
purblanka
flanko.*



Svisa kalendaro

Aprile

- 2 : Luzern : LES : Kunveno.
- 2 : Wil : EKW : Kunveno.
- 4 : **Limdato por proponoj al la Ĝenerala Kunveno de SES.**
- 7 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 12 : **Berno : SES : Ĝenerala Kunveno.**
- 17 : Etoy ; prelego de Hori Jasuo.
- 19 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
- 24 : Basel : ESB : Kunveno : Filmo.

Maje

- 5 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 7 : Luzern : LES : Kunveno.
- 7 : Wil : EKW : Filma kunveno.
- 17 : La Sagne : Koncerto kaj migrado.
- 29 : Basel : ESB : Kunveno.

Junie

- 7 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 3 : Genève : La Stelo : Diskuta kunveno.
- 4 : Wil : EKW : Gastprelego.
- 8 : Lausanne : LES : Tuttaga ekskurso.
- 10 : **Redakta datlimo de SES informas.**
- 11 : Luzern : LES : Kunveno.
- 21 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
- 26 : Basel : ESB : Kunveno : Grün' 80.

Julie

- 2 : Wil : EKW : Ekskurso al la turo de Wil.
- 9 : Luzern : LES : Kunveno.
- 17 : Basel : ESB : Kunveno ĉe Bérout-Focke.

Aŭguste

- 8 : Luzern : LES : Vespera ekskurseto.
- 18 : Wil : EKW : Tuttaga ekskurso al Heiden.
- 24 : Bettingen : ESB : Ekskurso.

Septembre

- 1 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 3 : Luzern : LES : Kunveno.
- 10 : **Redakta datlimo de SES informas.**
- 25 : Basel : ESB : Kunveno.

Oktobre

- 1 : Luzern : LES : Kunveno.
- 6 : Lausanne ; LES : Kunveno.
- 11 : Chaux-de-Fonds : André Cherpillod prelegas.
- 12 : La Vue-des-Alpes : A. Cherpillod prelegas.
- 23 : Basel : ESB : Kunveno.

Novembre

- 1 : Berna regiono Gantrisch : Familia renkonto.
- 3 : Lausanne : LES ; Kunveno.
- 8 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 12 : Luzern : LES : Kunveno.
- 15 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Studsabato.
- 27 : Basel : ESB : Kunveno.

Decembre

- 6 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 10 : Luzern : LES : Kunveno.
- 13 : Basel : Zamenhofa festo.
- 13 : Lausanne : Zamenhofa festo.

Venonta redakta datlimo de *SES informas*: 2008 Junie 10

La gvidantoj de la lokaj kaj fakaj societoj bonvolu atenti pri la venonta datlimo redakcia por la periodo julia-septembra de la venonta *SES informas* 2008-3, kiu aperos fine de aŭgusto 2008. Ili informu pri la datoj de la kunvenoj por la monatoj septembro-oktobro 2008 kaj eĉ por la resto de la tuta jaro 2008. Kaj ili ne forgesu raporti pri okazintaĵoj. Antaŭdankas pro tiu redakta kunlaboro Claude Gacond, CP 480 2301 La Chaux-de-Fonds. gacond@bluewin.ch